

RIFUZITA MEMUARO

Higinio García

Antaŭparolo de la ĥronikisto

Tute konscia pri la fakto ke mi faras valorjuĝon pri temo kiu superas kaj miajn konojn kaj miajn kapablojn, mi devas tamen honeste kaj firme esprimi mian konsternon pri la senbaza rifuzo, laŭ mi, de la Memuaro prezentita de sinjoro Delponto al la Alta Lernejo de Uzinurbo.

Pli precize, mi nek komprenis, nek komprenas, la komplikan refutadon antaŭenigitan de la Komitato: mi nur suspektas, ke la Memuaro estis resendita al la aŭtoro pro religiaj kialoj.

Kiel sciante, Dubĉeko Delponto jam de longe estis altirata de tiuj herezuloj kiuj kontraŭis la dogmon subtenatan de horoskopistoj kaj ortodoksaj ekonomikistoj, laŭ kiu Uzinurbo estis «ekonomia miraklo de l' Libera Merkato, kiu samtempe faligis teren la Berlinan Muron, kaj Nian Uzinon de l' ĉielo». Plie, kaj kvankam li neniam parolas pri tio en sia Memuaro, Delponto estis suspektata eĉ pri neado de la ekzisto de l' Nevidebla Mano kiu harmoniigas la individuajn merkatajn decidojn en la plej profitodonan rezulton por ĉiuj.

La fakto estas, ke, leginte liajn tezojn, min impresis ne nur la kvanto kaj kvalito de la dokumentaro citita, analizita kaj kritikita de la aŭtoro, sed ankaŭ kaj precipe ties kuraĝo: ĉar Delponto, riskante siajn sanon kaj vivon (sed tio meritos alian ĥronikon), rendezuis kun Vilfrido l' Androido, la Memoro de Uzinurbo, kaj povis konsulti ties kaŝitajn neŭrodatenarojn kaj eĉ la Forgesendajn Klasikaĵojn katenitajn en la Infero de la Biblioteko.

Ĉi tiu ĥroniko estas nur resumo: mi do preterlasas la imponan referencan aparaton de la Memuaro: ĉiujn piednotojn senescepte, ĉiujn ĝenerale konatajn kaj ne tro malfacile alireblajn verkojn; sed mi almenaŭ nomu la titolojn de la plej gravaj Forgesendaj Klasikaĵoj traserĉitaj de Delponto, esperante, ke eble la leganto opinios same kiel mi: la kialo de la rifuzo de la Memuaro ne troviĝas ĉe ia manko de scienca valoro aŭ intereso, sed ĉe la abomeno de la ortodoksa elito de Uzinurbo pri ĉiu verko kiu kontraŭdiras la Realisman Unikan Pensmanieron.

Jen do kelkaj verkoj traserĉitaj de Delponto: «La Biblio de Qumran»; «Kritiaso», de Platono; «Tlön, Uqbar, Orbis Tertius», de Jorge Luis Borges; «Ĉeesto de la Eksterteranoj», de Erich von Däniken; la Kompleta Verkaro de Raël; «Poemo de Utnoa», de Abel Montagut; la Kompleta Verkaro de John Ronald Reuel Tolkien; «La Universo en Nuksoŝelo», de Stephen Hawking; la sekretaj paĝoj 138 de la numero de oktobro 1968 laŭ la Historiaj Tempoj (de nun: HT), kaj 62 de la numero de aprilo 1969HT de la revuo Esperanto...

Tamen, ĉar mi estas nek teologo nek ekonomikisto, mi ripetis kaj insistas ke mi certe havas personan opinion, sed ne povas aŭtoritate juĝi la aferon. Por ke la klera kaj senpartia leganto juĝu, mi publikigas ĉi tiun resumon de la tezoj de sinjoro Delponto.

Ĝenerala tezo

La originala kaj propra skribo de Esperanto estas la tengvarsignaro de la elfoj.

Tezo unua

Eĉ se ne estas klare ĉu eksterteranoj ekzistas, ili tamen kontaktis teranojn.

Laŭ Jorge Luis Borges, la plej granda ĉefherezulo de Uqbar Tlön (koruptita formo de la esperanta Uĥbar-Tlojno) pretendis ke «speguloj kaj patriĝo estas abomenaj, ĉar ili obligas la mondon».

Nenio pli kontraŭa al la karaktero de la eksterteranoj (kiujn laŭ Borges oni povas nomi *uĥbaranoj* aŭ *tlojnanoj*, kiujn Platono nomas *theoi*, Raël *elohim*, Tolkien *valar*, kaj la aŭtoro de tiu Memuaro, pro pieco al la granda esperanta epopeo de Montagut, «Poemo de Utnoa», preferas nomi *gobanoj*): oni scias kiom ili amis sin multobligi ne nur per «kruciĝo inter estuloj», sed ankaŭ per klonado, kaj ke ili eĉ kapablis produkti, per la forto de siaj deziroj kaj per la fikseco de siaj ideoj, materiajn objektojn de ili nomatajn «hrojnoj». Do, kaj ilia idealismo kaj ilia multobligemo puŝis ilin al «amo inter emioj (racikapablaj estuloj) de malproksimaj astroj».

Tiel same, la ekstrema idealismo de tiuj estuloj kiuj plurfoje kontaktis kaj eble ankoraŭ nuntempe kontaktas nian planedon, komprenigas la kontraŭdirajn priskribojn de tiuj teranoj kiuj «vidis» -tio estas: perceptis- ilin.

La ŝajne plej ĝena malakordo temas pri ilia ekzisto mem. Ekzemple, laŭ Raël, kiu iam vizitis ties planedon, la «elohim» kreis la homaron laboratorie; kontraŭe, laŭ Borges, estis la membroj de la societo Orbis Tertius, kiuj komencis krei (tio estas imagi) Tlojnon en la XVIIIa jarcento HT, unue

kiel teran landon; kaj poste, en 1824HT, la milionulo Ezra Buckley, el Memphis, Usono, decidis elpensi planedon.

Sed tio estas nur, kiel dirite, ŝajna kontraŭdiro.

La irlanda episkopo kaj filozofo George Berkeley, membro de la societo Orbis Tertius, kiu paradokse ŝuldas sian filozofian sistemon al tiuj «tlojnanoj» parte «kreitaj» de li, neas la realon de substancoj, por konsenti pri la nura ekzisto de perceptoj: «esse est percipi»: ekzisti estas esti perceptata.

Nu, laŭ la «tlojna» metafiziko, la universo estas la aro de la perceptoj, aŭ kunligaro de ideoj. Se oni plie scias ke, laŭ la tlojnaj filozofoj, la metafiziko estas parto de la fantasta beletro, kiu devas serĉi ne la veron (ĉar tio estas la laboro de la psikologio), sed nur la miron (ankaŭ laŭ Aristotelo, «filozofi estas miri»), oni facile komprenas ke la problemoj de «ekzistado» kaj de «kreado» sensencas al la gobanoj: ĝi estas nesenchava problemoj de materiisma filozofio bazata sur la erara principo ke la mondo estas ne ideoj, sed aĵoj. Por ili, ne estas la objektoj kiuj «pafas» la menson por iĝi konceptoj, sed la ideoj kiuj fiksiĝas kaj konkrementiĝas ĝis formi aĵojn. Kaj Tolkien, siaflanke, asertas ke la universo estis perceptata de la «valar» unue kiel «dramo»; nur poste kiel «realaĵo». Teranoj do estas perceptoj de gobanoj (kio pravigas Raël-on), kaj gobanoj estas perceptoj de teranoj (kio pravigas Borges-on): ĉiu «kreas» tion, kion li perceptas.

Tiel do solviĝas la problemoj ne nur de la ŝajna kontraŭdiro pri la «fantasta kreo» kaj «reala ekzisto» de la eksterteranoj, sed ankaŭ de la aliaj ŝajnaj kontraŭdiroj pri

ties aspekto kaj konduto: evidente, ili ne estis same perceptataj de estuloj tiel malsimilaj kiel elfoj, nanoj, hobitoj aŭ homoj, apartenantaj al tiel malsamaj eraoj, epokoj kaj kulturoj, kaj pensantaj per tiel malsimilaj lingvoj. La principo ke ĉiu lingvo havas propran mondokoncepton estas akceptata eĉ de materiistoj. Certe, la «theoi» de Platono, la «valar» de Tolkien, la «uñbaranoj» de Borges, la «elohim» de Raël, la gobanoj de Montagut malakordiĝas: sed ĉiu verkisto (oni devus prefere diri «hrojnistoj», konkretiganto de ideoj), apartenis al sia kulturo, parolis sian lingvon kaj havis sian propran perceptadon de la mondo.

Tezo dua

La gobanoj kontaktis teranojn por pacaj kaj amaj celoj, ĉiuokaze finiĝintaj per ia katastrofo: tial ili ĝis nun ne povis lasi sin koni de ordinaraj homoj.

Rimarkinde estas ke ĉiuj «verkistoj», ĉiuj perceptokreantoj, akordiĝas pri la idealismo de la gobanoj, pri ilia amoremo, kaj pri la tragikaj finoj de ties aventuroj.

Oni konas, per Tolkien, la edziniĝon de la «maiar» Melian kun la elfo Elwe Singollo, kiu iĝis reĝo, kaj estis murdita; Melian revenis hejmen, kaj la lumo estingiĝis en la regno. Per Platono, la amaferojn de la «theoi» en la Atlantido kaj ties dronon en la oceanon al kiu ĝi lasis sian nomon. Oni konas per Montagut la tragedian finon de la amo de la gobano Loedu, filo de Numu, kun teranino... kaj la postsekvan diluvon. La Biblio informas nin pri la aventuroj de la «B'ne Elohim» kun la «filinoj de la homoj», kies kruciĝidoj, la gigantaj «r'faïm», kaj precipe la filiŝtoj

Goljat el Gat, estis problemfonto por David, ĉar tiu Goljat devis esti mortigita almenaŭ du fojojn: unue de David mem, kaj poste de Elĥanam, filo de Jaare-Orqim, Bet-Leĥemano (eble, kiel kruciĝido, Goljat estis «hrojno», fiksa ideo aŭ pens-duobligita percepto de du -aŭ pli- batalemaj herooj). Kaj fine de la historiaj tempoj, Raël, kiu havis la fortunon viziti la planedon de la «elohim», rivelis al ni la erotikan karakteron de ties religio, la «sensplezuran meditadon», ilian manieron preĝi, kaj ilian nehaltigeblan emon al klonado. Konsekvence, la ĵurnalistoj senrespekte nomaĉis lin «sinjoro Vorillon» kaj la cetera homaro obstine rifuzadis konstrui la postulatan ambasadejon.

Alia fakto, hodiaŭ forgesita, ĉar siatempe zorge kaŝita de la itala registaro kaj de la Universala Esperanto-Asocio, estis la dronigo de la Insulo de la Rozoj, la unua sendependa esperantlingva ŝtato.

Sub influo de iu gobana belulino, la inĝeniero Giorgio Rosa el Bologna, Italio, en la jaro 1964HT, decidis starigi la unuan suverenan ŝtaton kies oficiala lingvo estu Esperanto: la Liberan Teritorion de Insulo de la Rozoj. Por tio, li konstruis platformon je 400 kvadrataj metroj proksime de la banloko Rimini, tamen ekster la marborda akvareo de Italio. La platformo estis finfarita la 22an de junio 1968HT; sed post nelonge la itala polico detruis ĝin, pretendante ke la Insulo minacis la ŝtatan sekurecon de Italio kaj ke ĝi estis loko de «nedireblaj eksterleĝaj punktoj».

La revuo Esperanto raportis, kion la itala ŝtato rakontis. Tio, kion Esperanto ne raportis, estas:

1) ke fakte, ĉar la Insulo de la Rozoj estis bazo por la gobanaj nifoj, ĝi estis perceptita ne nur de la itala ŝtato, sed ankaŭ de la usona sekreta spiona agentejo CIA, kiel reala minaco; kaj

2) ke la tielnomataj de la revuo Esperanto «nedireblaj eksterleĝaj punktoj» estis preseraro, tre eble vola, anstataŭ «nedireblaj eksterteraj punktoj»: la jam konata «kruĉiĝo inter estuloj el ambaŭ specioj».

Strange, la Insulo de la Rozoj, kvarlatera kiel Atlantido, sinkis en la Oceanon eble pro la samaj kialoj: minaco al najbara ŝtato, kaj «korupteco de moroj». Jen la ĉiama afero, kiu ripetiĝas, ŝajne, ĉe ĉiu kontakto de idealismaj eksterteranoj kun materiismaj teranoj.

Tiuj faktoj kaj aliaj, kiujn ni ne havas spacon por analizi, eksplikas ke la homaro, kiu ĉiam malfidas idealistojn, obstine neas eĉ la ekziston de gobanoj.

Tezo tria

Zamenhof estis nek la kreinto de Esperanto nek la konceptinto de la netuŝebleco de la Fundamento.

La plej naiva mito pri Esperanto, kaj tamen la plej disvastigita, eĉ de D.ro Z. M. Silosek ne malkovrita, estas ke Ludoviko Lazaro Zamenhof elpensis Esperanton.

Zamenhof multajn faktojn kaŝis: ne nur sian nomon kaj la devenon de la radiko «edz-», sed ankaŭ ke li havis kontaktojn kun iu gobanino, kies lingvo estis Esperanto, kaj ke tiuj kontaktoj estis eĉ pli intimaj ol permesate de la tiutempa moralo.

Estis tiu gobanino, nomata Edza, kiu enlite instruis al li sian lingvon. La fuŝaj provoj de 1878 kaj 1881, elvenas el la fakto ke, kiel okulkuracisto, li estis pli vidiva ol aŭdiva, kaj mise transkribis la parolatan lingvon de la gobanoj.

Kaj estis tiu sama gobanino Edza kiu konvinkis Zamenhof pri la «netuŝebleco» de la Fundamento. La gobanoj tiufoje ne volis ripeti la babelturan fuŝon: kiam ili jam estis pretigintaj unulingvan homaron regatan de pac-kaj-amema geniulkratio, kaj kiam la Babelturo, tio estas la Ambassadejo (laŭ iuj, la Komandejo) pri kiu ili ĉiam revis, jam preskaŭ pretiĝis, jen, ili pretervidis la subterajn agojn de tiuj «plibonigantoj» de la lingvo, kiuj, flatante simplulojn, fariĝis gurooj de lingvaj sektoj. Tiuj reformistoj esperis (kiel ankaŭ Zamenhof, sed pro aliaj kialoj) supreniri la ŝtupojn de la geniulkratia hierarĥio sin apogante sur sia «mobiliziga povo». Oni konas la sekvon.

Tial, ĉi-foje, por ke tiaj epizodoj ne ripetiĝu, ili decidis ne utiligi aŭ helpi iun ajn regnon, sed tion, kio plurfoje fiaskigis ilian celon: la naturan tendencon de la homoj sekvi kapulon.

Ili do elektis idealisman, profeteman doktoron Zamenhof, kaj altiris lin per la beleco de Edza. Klara, lia edzino (ni preterpasu la kruelan vortludon), evidente nenion sciis pri la eksteredzecaj amaferoj de Ludoviko, precipe ĉar la geamantoj rendezuis skribe, per la gobana signaro. Sed, kiam, fine, Zamenhof estis publikigonta la Fundamenton, li sin trovis antaŭ angora elekto: ĉu esti blinde fidela al la gobanoj (sed li ja estis okulkuracisto) kaj transdoni ties

lingvon laŭ la instrukcioj de Edza, en la gobana skribo, kaj permesi ke Klara, iam lerninte Esperanton, povu legi ilian ardan korespondadon, kaj tiam perdi kaj sian edzinon kaj sian familion kaj sian honoron, aŭ publikigi la Fundamenton en pli-malpli bone adaptita latina alfabeto kaj perdi la promesitan postenon de kapulo de la tuttera geniulkratio?

Zamenhof multe amis kaj sian edzinon kaj sian familion kaj sian honoron: li do elektis la latinan alfabeton.

La gobanoj, kiel ĉiuj idealistoj, jam al kutimiĝis malsukcesi: ili do reiris je iksa fojo al sia planedo. Edza redonis al Ludoviko ties amleterojn, kunligitajn per verda rubando, kaj akompanis ilin. De la ekstertera amo de Zamenhof restis nur ŝiaj korespondaĵoj, kiujn li, pro romantikismo, konservis, sed zorge kaŝis.

Tiu gobana korespondado de Zamenhof iel alvenis al Uzinurbo, eble pere de iu japana pioniro, kiu iel ĝin elhavis de la esperantologo Ludovikito, kaj nun troviĝas en la Biblioteko, nemalfacile alirebla; ĉar, ĝis la verkado de tiu Memuaro, oni rigardis ĝin sendanĝera nekomprenebla kuriozaĵo. Tamen, la aŭtoro oftege ĝin kontemplis, fascinata de la simpla beleco de ties strekoj kaj kurboj.

Tezo kvara

La propra skribsistemo de Esperanto ne estas la latina alfabeto, sed la tengvar-signaro de la elfoj, kiun ili lernis de la gobanoj.

La gobanoj postlasis al la homaro, kiel ĉiu scias, aŭ devus scii, inter aliaj, la klonadon, la tarokojn, la akaŝikajn arĥivojn, la vegetarismon, la astran vojaĝon, la

idealisman filozofion... kaj Esperanton, kies origina skribo ne estis la latina alfabeto, sed tiu signaro malkovrita de Tolkien, laŭ li nomata «tengwar», utiligita de la elfoj. Ĉiu popolo konservis kio estis plej proksima al ĝia kulturo kaj karaktero; ekzemple, la ciganoj, la tarokojn; la kalifornianoj, la vegetarismoj; la britoj, la astran vojaĝon..., kaj la elfoj, la esperantan skribon, kvankam ne la lingvon: ankaŭ ili estis viktimoj de «reformistoj». Eĉ la skribon ili reformis por ĝin adapti al siaj novaj lingvaj strangaĵoj. Tial, la Tabulo de Tolkien ĉi sube prezentata, estas restaŭrita laŭ la esperantaj sonoj kaj kompletigita laŭ la donitaĵoj de la leteroj al Edza.

Kaj nun, por fini, estu permesate al la aŭtoro diri, kelkvorte, kiel li alvenis al siaj tezoj, kaj klarigi kial li eksentis la bezonon, la neceson, verki tiun Memuaron.

Antaŭ kelkaj jaroj, dum esplorado pri la historiaj pratempoj, li malkovris la verkaron de Tolkien. Oni ne povus imagi lian surprizon, kiam, legante «La Mastro de l' Ringoj», li sin trovis antaŭ tiuj strekoj kaj kurboj tiom ofte admirataj sur la misteraj leteroj de Zamenhof. La surprizo ŝanĝiĝis en ekzaltegon, kiam li alvenis al la fino de la tria volumo, precize al la Apendico E. Tiam, komparante la signojn de la Tabulo kun tiuj de la leteroj, malgraŭ la malfacilaĵoj de la zamenhofa kursiva skribo (signoligaĵoj, mallongigoj, kelkfojaj mankoj de vokalsignoj, kaj eĉ konfuzo de parencaj grafemoj), kaj malgraŭ la adapto de la Tabulo al la elfaj idiomoj, li fine povis malĉifri la originan, korektan kaj veran skribon de Esperanto. Fine, post pluraj jaroj da legado, serĉado kaj esplorado, li sukcesis arigi la

puzlerojn de la rilato inter Zamenhof, la gobanoj, la elfoj kaj Esperanto.

Konkludo

La aŭtoro rekomendas al la Alta Lernejo de Uzinurbo, ke ĝi adoptu la tengvaran kiel propran kaj originan skribon de Esperanto, kaj ke ĝi instigu la Akademion de Esperanto por ke tiu skribo estu ĝenerale adoptita.

Aldono

Tabulo de la Apendico E de la tria volumo de «La mastro de l' Ringoj», «La reveno de la reĝo», kompletigita de la donitaĵoj de la Leteroj al Edza.

	I	II	III	IV	VII
I	¹ p t	² p p	³ c ĉ	⁴ k	⁴² ĵ p
2	⁵ d	⁶ b	⁷ ĝ ĝ	⁸ g	⁴³ ĵ ĉ
3	⁹ s	¹⁰ f	¹¹ ŝ ŝ	¹² ĥ ĥ	⁴⁴ ĵ ĥ
4	¹³ z	¹⁴ v	¹⁵ ĵ ĵ	¹⁶ ĥ ĥ	⁴⁵ ĵ x
5	¹⁷ n	¹⁸ m	¹⁹ c c	²⁰ vokalo	⁴⁶ ĵ w
6	²¹ l	²² ŭ ŭ	²³ j j	²⁴ r r	⁴⁷ ĵ y
V	²⁵ ' ' "	²⁶ " " "	²⁷ ! ! !	²⁸ ? ? ?	⁴⁸ ĵ q
	²⁹ . . .	³⁰ , , ,	³¹ : : :	³² ; ; ;	⁴⁹ Majusklo
	³³ λ ()	³⁴ d 0, #	³⁵ λ - -	³⁶ o ...	⁵⁰ duobla
VI	³⁷ v a	³⁸ v e	³⁹ i	⁴⁰ ~ o	⁴¹ ~ u
	³⁷ ^	³⁸ v	³⁹	⁴⁰ ~	⁴¹ ~
					⁵⁰ ĵ ĵ

Klarigoj

1. Oni rimarku ke tiu signaro enhavas grafike la saman elegantan simplecon kiel la esperanta gramatiko: ĉiu konsonanta signo estas konstruita per nur tri elementoj: la **tigo**, la **arko** kaj la **ŝnuro**. La tigo estas longa aŭ mallonga, dekstra aŭ maldekstra, kaj, se longa, alsupra aŭ altera. La

arko povas esti simpla aŭ duobla, alsupra aŭ altera, kun ŝnuro aŭ senŝnura.

2. Preskaŭ ĉiu konsonanta signo havas rilaton kun sia sona signifo:

a) la kolumno I, kun maldekstraj tigoj kaj alsupraj arkoj simbolas la dentosonojn;


b) la kolumno II, simila al I, sed kun ŝnuraj arkoj, simbolas lipsonojn;

c) la kolumno III (renversita I), la palatsonojn;

d) la kolumno IV (renversita II), la velsonojn, kun aldono de la vokalsigno kaj de «r»; eble, ĉar la unua estis perceptita kiel sensona «h», kaj la dua, aŭ estis elparolata «france» de la elfoj aŭ de la gobanoj, aŭ, pli eble, ĉar ĉi tiuj decidis ke ideala tabulo ne havu sep signojn en la unua kolumno, ses en la dua kaj la tria, kaj nur kvin en la kvara.

e) Oni ne scias ĉu la signoj de la kolumno VII estis inventitaj de Zamenhof, aŭ ĉu ili apartenas al la origina gobana skribo por transliteri teranajn nomojn kaj vortojn.

3. La vokaloj, linio VI, estas super- aŭ subsignoj de la

konsonantoj:  «Es-per'ant'o».

a) Supermetitajn vokalojn oni prononcas antaŭ la

konsonanto:  «al»; submetitaj, poste:  «la».

b) La signo 20 estas apogilo por izolitaj vokaloj, ĉiam supermetitaj, ĉar oni ne skribas du vokalojn ĉe la sama

konsonanto, escepte kiam oni transliteras fremdajn vortojn:

p^hie^hrre «P-ie-rre»; sed: **o^hle^ho** «o-le'o».

4. Kiam radiko komenciĝas per vokalo, ĉi tiun oni skribas

a) izolita, se ĝi formas silabon: **o^hle^ho** «o-le'o»;

b) supermetita, se ĝi eras inversan silabon: **am^ho** «am'o».

5. Oni skribu radikokunmetojn laŭ ĉies propra karaktero:

oni skribu do nek «a-mo» nek «a-m-o», sed **am^ho** «am'o»; ne

«i-ri-gi», sed **ir^hig^hi** «ir'ig'i»; simile **ra^hdik^ho^hkun^hmet^ho^hjn**

«tra'ir'end'a». Tamen, en maldekstra parto de kummetaĵo, oni mallongigas la vokalsignon: ne «ra-dik'o'kun'met'ojn», sed

ra^hdi^hko^hkun^hmet^ho^hjn «ra-di-ko'kun'met'ojn».

6. La signo 25 estas la apostrofo: **de^hl^hhomo** «de l' homo».

7. La signo 26 estas la citilo, skribenda nur dekstre,

se la citaĵo estas unuvorta: **jes^h** «la vorto <jes>».

8. Oni skribu la signojn de la tabulero V sen interspaco, escepte de la tripunkto (36):

li^hdiris^h: «kio? au kiu...?» «li diris: «kio? au kiu...?»»

9. La ciferoj 1 al 9 estas la signoj de la kolumno I kaj

tiuĵ de la linio 6: **pp^hhh^hmm^hnn^haa**. La signo 34 estas

a) la cifero 0, dekstre de alia cifero;

b) indikilo de nombro, maldekstre. Tiel, **dlpcaan**
«1887»; **pl d-pam-6m pl v'eghpca d-pad-d-b** «la 25.an de
aŭgusto 2003».

10. La signoj 49 korespondas al la majuskloj.

a) Ĉe propra nomo, se ĝi estas unuvorta, oni skribu
nur la dekstran signon post la nomo: **hmmzob**
«Zamenhof»;

b) se ĝi estas plurvorta, oni skribu la maldekstran
signon antaŭ la unua vorto, kaj la dekstran post la lasta:
lpcaamca pl pmca «Poemo de Utnoa» (atentu: «po-e-
m'o», ne «po'em'o»).

c) Oni skribu kunmajuskle nek la unuan vorton de
paragrafo nek postpuktan vorton.

d) Oni ne skribu finan punkton de alineo: alineo
sufiĉas.

11. La intera punkto de 50 duobligas la konsonanton:

h'mca «fi-nn'a». Tamen, oni ne utiligu ĝin kiam du samaj
konsonantoj apartenas al malsamaj radikoj: **pppca**
«tut'ter'a».

12. Kiam neesperantaj nomoj kunportis kromsignojn,
Zamenhof skribis ilin kiel en la origina lingvo:

phořak «Dvořák».

13. Ekzemple (manskribo de Dubĉeko Delponto):

ĉi tiu ĉi estas la unua parto de la
historio de la Esperanto kaj al la Alta
Lernejo de Uzinurbo por apogi la Memuaron kaj postuli tujan
reformon de la esperanta skribo.

Postparolo de la ĥronikisto

Se la tezoj de s.ro Delponto konvinkis la leganton, mi petas al li skribi al la Akademio de Esperanto kaj al la Alta Lernejo de Uzinurbo por apogi la Memuaron kaj postuli tujan reformon de la esperanta skribo.

Se, malgraŭ ĉio, li restas skeptika, ĉar li apartenas al tiuj homoj ne havantaj la kuraĝon kontraŭstari la oficialan sciencon kaj la tradician sintenon, li almenaŭ povos utiligi la tengvaran signaron kiel «sekretan abocon» por verki sian intiman taglibron.